

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 17 Eberswalde 1987-08-31

---

## 1. Raporto pri niaj kunvenoj dum la Jubilea Kongreso en Varsovio

### 1.1. La sekvontaj IFREanoj partoprenis:

S-ro Antal Barasevich,  
 s-ino Maria Bułka, ul. Górna 2, woj. Wałbrzych, PL-57-550 Stronie SL,  
 inĝ. Boris D. Marinov  
 s-ro Karol Pacholczyk,  
 s-ro Sandor Oroszi,  
 s-ro Ulf Ribers  
 s-ino Ingeborg Simon  
 d-ro Karl-H. Simon  
 s-ro Otto Vana,  
 s-ro Julio Smildzinš, str. Lemešu 17-13, Riga-16, SU-226016,  
 s-ro Zbigniew Wolniarski, Plac Rybaków 15, PL-81-734 Sopot.

Krome ĉeestis dum unuopaj kunsidoj:

s-ro Malte Markheden, verkisto kaj multjara helpanto de nia laboro,  
 s-ro Arnosšt Vana, honora prezidanto de la Tutmonda Esperantista Vegetarano Asocio (TEVA)  
 s-ro András Lukács, ĉefredaktoro de komputila-revuo "Fokuso"  
 s-ro Ru H. Bossong, estro en la Rondo Esperantista de Flaŭristoj,  
 s-ro Lew Medvedev, vicprezidanto de Scienc-Teknika Komisiono de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj aliaj interesuloj.

1.2. Skribe salutis nin s-ino Valentina Kovalëva. Ŝia surprizo por la ĉeestantoj estis ta fotomuntaĵoj de tiuj IFREanoj, kiuj dendis al ŝi la petitajn fotojn. S-ino Kovalëva atendas la mankantajn fotojn de la aliaj IFREanoj por kompletigi la muntaĵon.

### 1.3. Sub la gvido de s-ro Marinov kelkaj kunsidoj okazis. La enhavo estis:

1.3.1. Raporto de d-ro Simon (vd. aldonajon)

1.3.2. D-ro Simon distingis la ĉeestantajn pionirojn de IFRE, s-rojn Boris D. Marinov kaj Sandor Oroszi per medalo, kiu estas kreita okaze de la cent kvindeka datreveno de la naskiĝtago de la forstscienco en Eberswalde. La medalo estas farita el porcelano, tiel nomita "Bethër-porcelano" de la manufakturo en Meißen (Majsen) en GDR, kie Bethër eltrovis la European porcelanon. Sur la medalo estas skribita germane "Por meritoj dum la evoluo de la forstsciencoj".

- La aliaj pioniroj d-ro Weckwerth, s-ino Steinert, s-ro Maserov, s-ro Landmann, s-ro Pachter kaj s-ro Ullrich ricevos la medalon post la kongreso.

1.3.3. En la diskuto s-ro Medvedev informis nin pri la rezulto de du pasintaj Ekologiaj Esperanto-ekspedicioj laŭlonge de rivero Dnestro. La ekspedicioj laŭlonge de Danubo en 1987 kaj la sekvontaj jaroj ankoraŭ bezonas internacian penon. S-ro Medvedev proponis, ke la malmultaj forstistoj kuniĝi/aliĝi al la ekologoj kaj formi komunan fortan organizaĵon. D-ro Simon rifuzis la proponon diskuti la organizaĵ-aferon, ĉar ne estus fekunde, kaj ĝis nun ni sukcese laboris sen aliĝo al iu ajn alia faka organizaĵo. La ĉeestantoj konsentis. S-ro A. Vana transdonis la salutojn de la ĉeĥoslovakaj forstistoj. Li asertis, ke la vorto "forsto" estas tute superflua. Zamenhof uzis la simplan vorton "arbaro". La esprimo "forsto" estas malfacile prononci por la orient-azianoj. S-ro A. Vana invitis nin, realigi "arbaristan" renkontiĝon en sia hejmloko kun belega ĉirkaŭo,

an Dudince, ĈSSR, dum ekster la ĉefsezono. La restadon li povus prizorgi favorokoste – ĉ. 80 ĝis 100 Kĉs. potage. La propono de s-ro Wolniarski ekskursi dum unu antaŭtagmezo tra arbaroj de la ĉirkaŭo de Varsovio ne povis esti realigata, ĉar nur malmultaj forstistoj povis partopreni. Laŭ propono s-ro Pacholczyk estis komisiita publiki noton pri la IFRE-kunvenoj en la kongresa bulteno. La IFREanoj aprobis la sekvontajn rekomendojn.

- 1.3.4. Rekomendo de la IFRE-kunveno okaze de la Jubilea Universala Kongreso en Varsovio en 1987
  1. La terminologia kaj vortara laboroj surbaze de slipoj, preparitaj en Eberswalde, sukcese paŝas antaŭen kaj oni daŭrigu ilin, celante prepari la unuan parton de multlingva fakvortaro de A ĝis Z kun ĉ. mil nocioj.
  2. Ĉiuj IFREanoj partoprenu en la ellaborado de Esperanto-lingvaj artikoloj, tradukoj kaj prelegoj por la Forstista Informilo, aliaj revuoj kaj fakaj kunvenoj. La aplikado de Esperanto en la forstiscienca literaturo pligrandiĝu.
  3. La ĝisnuna laboro de IFRE, gvidita de la s-anoj d-ro Simon, Marinov, Pachter kaj Ullrich, estas daŭrigota sub tiu ĉi estraro.
  4. S-ano d-ro Simon reprezentu la aferojn de IFRE en la Terminologia Esperanto-Centro de UEA.
2. Je la 25a de julio la estraro de UEA aprobis la fondon de Terminologia Esperanto-Centro (TEC). Dum la unua kunveno je la 27a de julio la Estraro nomis la membrojn de la Komitato, i.a. d-ron Simon kiel Rerezentanto de IFRE. Dum kelkaj kunsidoj TEC diskutis la norman dokumenton pri aranĝo kaj aproba procedo de normaj dokumentoj (t.e. precipe terminaroj).
3. La sekvonta kunveno de IFREanoj okazigos laŭ tradicio dum la “Internacia Foira Esperanta Renkontiĝo” (IFER) en Leipzig, en 1988 de la 11a ĝis 13a de marto. Aliĝo estas rekomendinda ĝis la jarfino ĉe “Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER '88, Käthe-Kollwitz-Str. 115, Leipzig, DDR-7010”.

K.-H. Simon

## Aldonaĵoj

### **Post kvinjara laboro de la Internacia Forstista Rondo Esperantlingva (IFRE)**

1. Bazaj rimarkoj pri la laboro de la IFRE-anoj
  - 1.1 La jubilea kongreso de Esperanto estas okazo taksu la historion de la Esperantomovado kaj ankaŭ revizi nian laboron ekde la jaro 1982, kiam la grupo ekestis. D-ro Ludoviko Zamenhof konsideris sian lingvokrean agadon kiel aldonaĵon por la firmigo de la mondpaco kaj plifortigo de interkompreno inter la popoloj. La progresoj dum la solvo de tiuj problemoj tre influas niajn grup-agadojn, kaj reciproke, ni celas per nia laboro finfine apogi la konservadon de la mondpaco kaj la konversacion de la popoloj.
  - 1.2. La agadon, kiun ni intencas, estos malfacila kaj postulas multe da tempo, sed ni estas esperantistoj kaj konas la komplikan vojon de Esperanto. Kiam mi hodiaŭ legas tiun ĉi frazon el la unua numero de nia Forstista Informilo, mi estas feliĉa, ke el la tiamaj 13 forstistoj ankoraŭ 9, ĉiam ankoraŭ, partoprenas en la terminologia agado kaj du pluaj forstistoj daŭrigas la kontakton kun nia grupo. Mi tre dankas pro viaj sindonaj kaj obstinaj agadoj por estonta pli bona interkompreniĝo de forstistoj, havantaj gepatrajn lingvojn diversajn. Sed ĉiuj plantas kaj flegas la arbarojn por paca vivo de siaj gefiloj, genepoj kaj pragenepoj.
2. Apartecoj dum la farado de la forstfaka terminaro.
  - 2.1. Kiam en la jaroj 1981/82 ni korespondis kaj diskutis pri terminologia kaj fakvortara laboroj, ni konsentis, komenci nian agadon sur la bazo de la kvinlingva “Wörterbuch der Forstwirtschaft” (Fakvortaro de la Forstmastrumado), eldonita de prof. Weck, laŭ

alfabeta vico, kvankam ni sciis aŭ sentis, ke la unua paŝo estu klasifikado de nocioj. Ĉiam denove estas skribita en la literaturo, ke estas grava eraro, komenci sen klasifikado. Jes. Sed ni opiniis, ke estas pli granda eraro, ne komenci la terminologian agadon, perdi la pretajn kunlaborantojn. Denove disvastiĝus malespero, kiel ĉe kelkaj Esperanto-forstistoj, kiuj jam dum multaj jaroj vane atendis terminologian laboron. Ĉar en tiu tempo (en 1982) neniu estis preta, estis kapabla, krei tiun klasifikadon, ni komencis la laboron sen klasifikado. Do politikaj<sup>1</sup> kaŭzoj instigis nin tuj komenci la laboron. Tiuj ĉi kaŭzoj predominis la kaŭzojn de la terminologia teorio. Kompreneble ni estas konvinkitaj, ke la klasifikado estas grava laboro, kiun ni ankoraŭ devas plenumi. Kiam? Jam tiutempe kaj post la kreado de la unuaj mil terminoj, t.e. la intencita unua etapo. Sajnas al mi, ke mil terminoj jam ankoraŭ estas trarigardeblaj por posta klasifikado.

- 2.2. Sekve de la nomitaj kaŭzoj ni ankaŭ komencis la laboron sen difinoj. Post la stabiĝo de la labororganizaĵo – post unu jaro – ni kompletigis la eldonitajn slipojn/nociojn/artikolojn per la necesaj difinoj. Intertempe nia prilaborado de nocio ĉiam komenciĝas per preparo de la difino de la nocio.
3. Pri la organizado de la kunlaborantaro kaj uzeblaj kooperadoj .
- 3.1. Ni decidis, krei la Esperanto-lingvan forstan terminaron kadre de kompilado de multlingva vortaro, ĉar la nombro de la uzantoj tial multobliĝos. hodiaŭ ni povas konstati, ke tial ankaŭ multobliĝis la nombro de kunlaborantoj.
- 3.2. Estas unu el la plej gravaj aferoj de nia agado, ke la esperantistoj pli kaj pli estiĝas la perantoj de tiu ĉi internacia laboro. Preskaŭ ĉiu Esperanto-forstisto nia rondo apogas sin sur la helpo kaj konsilo de kromaj forstaj kompetentuloj. Hodiaŭ ne estas ebla indiki la nombron de la kunlaborantoj, certe pli ol 50. Ni petas informi nin pri la nomoj de ĉiuj, kiuj subtenas nian laboron.
- 3.3. En Eberswalde, kadre de la ampleksa inĝeniera organizaĵo de GDR, de “Kammer der Technik” (Ĉambro de Tekniko), oni organizis laŭ instigo de Esperanto-forstistoj apartan faksektion pri forsta terminologio kaj plurlingva fakvortaro. Pli kaj pli forstistoj ekkonas la bezonon tiurilate. Ankaŭ la grupanoj en aliaj urboj kaj landoj pripensu la eblecojn de firma kunlaborado kun aliaj (fak)organizaĵoj.
- 3.4. Estas progreso, ke ni nun havas kunlaborantojn, forstistojn kun la sekvaj gepatraj lingvoj: Bulgara, ĉeĥa, germana, hungara, itala, nederlanda, pola, rusa, slovaka, sveda kaj turka. Tiu ĉi nombrado montras samtempe la breĉojn. Reprezentantoj de disvastiĝantaj lingvoj precipe de ekster Europo mankas.
- 3.5. En la jaro 1982 ni skribis, ke “oficiala formado de nia fakgrupo – eble en la kadro de ISAL aŭ ILASE aŭ en alia kadro – estas demando de estonteco.” Plurfoje ni diskutis la aferon kaj kontaktiĝis kun tiuj organizaĵoj. La agadoj de ili ĝis nun ne montriĝis tiom alloga kaj progresiga, ke aliĝo estus avantaĝo por nia laboro – en la senco de parto de forstfaka laboro aŭ kiel parto de tutmonda esperantista laboro. La forstistoj ĉeestintaj en 1985 en Augsburg “opiniis, ke estus plej bone starigi ‘Fakan Asocion’ ĉe UEA.” Ni devas konstati, ke la formado de unuanima opinio ne finiĝis.
- 3.6. En Augsburg Terminologia Sekcio (TeS) de UEA estis komisiita prepari la fondon de Terminologia Esperanto-Centro (TEC). Oni planas fondi tiun ĉi Centron dum la Jubilea UK en Varsovio. Respondeca organo de TEC estos la Estraro. Gvida organo de TEC pri konceptaj kaj perspektivaj problemoj estos la Komitato, en kiu estos la reprezentantoj i.a. de fakaj Esperanto-asocioj. Ĉar rilate nian terminologian laboron ni

<sup>1</sup> Politiko konsiderata kiel arto eltrovi la interesojn de plimulto kaj kiel oni povas celtrafe uzi la ekzistantajn eblecojn.

bezonas tiun ĉi kontakton, ni proponis akcepti reprezentanton de IFRE. Sekve de tio TeS invitis reprezentanton de IFRE al la unua TEC-konferenco dum la UK.

4. La stato de la terminologia/vortara laboro kaj estontaj taskoj.
- 4.1. Ĉiuj kunlaborantoj atendas informon pri la nuna stato de nia terminologia/vortara laboro kaj pri la planita daŭrigo. La difinoj de ĉirkaŭ mil nocioj – elektita de A ĝis Z el la vortaro de Weck – estas pretaj. Nun ni devas pruvi, ĉu ĉiuj nocioj, al kiuj oni rilatas – indikita per asteriko – en tiuj difinoj, estas en nia kolekto de nocioj. Se ne, tiuj ĉi nocioj estas ankoraŭ definendaj, dum ni daŭrigas lla klasifikadon de nocioj. La unua versio de slipoj/artikoloj estas eldonita ĝis numero 700. La 50 sekvontaj estas preparitaj kaj estos elsendataj ĝis la jarfino. La prognozo komence de la jaro 1983 (v. FI 4/1983), ke ni povas prepari po jaro nur ĉ. 150 slipojn, montriĝis vera. La .1-versio-slipojn ĝis numero 300 vi certe ricevis dum la lastaj tagoj.  
La Malgranda Komisiono diskutis la proponojn de Esperanto-terminoj ĝis la numero 570. Sekve de la resenditaj proponoj rilate al la .3-versio ni devis ŝanĝi unuopajn terminproponjn jam publikitajn en nia FI. Listo de prilaboritaj terminoj ni tiutempe preparas por FI. Ĝis nun la komisiono proponis ses novajn vortradikojn kaj pligrandigon de la signifo de sep vortoj, kiuj enhavas PIV (v. FI 14/1985). Per la engaĝiĝintaj kaj oferemaj agadoj de J.A. Pachter ni disponas en Eberswalde ankaŭ pri PIV kaj ĉiu komisiono pri kopio de la “Scienca kaj teknika Terminaro”. De s-ino Kovalëva ni ricevis dankinde angla-rusan kaj de s-ano Moudry kvin-lingvan forstfakajn vortarojn. – Ĝis la fino de la nuna jaro ni intencas kompletigi la “Bibliografion de arbarmastrumada literaturo”.
- 4.2. La Malgranda Komisiono estas afliktita pri tio, ke ĝis nun ne ekzistas konvena propono rilate Esperanto-lingviston, kiu povas kaj volas kontroli la forstajn Esperanto-terminproponjn. Ni esperas, ke la estiĝanta TEC helpas nin.
- 4.3. La ĝisnunaj kunvenoj de IFRE-anjo ĉiam prosperigis nian laboron, sed nur kelkaj povis partopreni. Aparte pro vojaĝrestriktoj en multaj landoj kaŭze de la “malvarma milito”, por kelkaj anoj la pagado de vojaĝo estas tre prema aŭ nesolvebla problemo. Des pli grava estas la leteraj kontaktoj, la uzado de privataj vizitoj kaj informado per nia Forstista Informilo. Ni ripetas: Ĉiu estas invitata sendi kontribuojn, se oni deziras publiki en FI. Ĉar ni ne pretendas Copy-right -rajtojn en FI, tiajn kontribuojn oni povas publiki ankoraŭ en aliaj journaloj. Kvankam en la nunaj jaroj la laboro de IFRE koncentriĝas sur la terminologia/vortara laboro, ni ne forgesu la aplikadon de Esperanto en fakartikoloj, prelegoj, tradukoj ktp. S-anoj I. Ullrich, B.D. Marinonov, J.A. Pachter kaj U. Ribers donas al ni tiurilate elstarajn ekzemplojn. Forstistoj prelegis sur kelkaj pli grandaj kunvenoj, kiel AEST’81 en Žilina, SAEST’82 en Českě Budějovice, AEST’84 en Brno kaj ISEU’86 en Veliko Târnovo. Grava estis ankaŭ la partopreno de s-ano Pachter en kelkaj fakaj kongresoj kiel ano de IFRE.
- 4.4. Esenca parto de racia labor-organizado estis kaj estos la perkomputila prilaborado de la slipoj. Rezulto de tiamaniera labormaniero estas, ke la .1-versio povas esti eldonata kiel celata elekto de la lingvoj. Tiuj lingvoj, kiujn preskaŭ ĉiuj kunlaborantoj bezonas, estas multobligataj survoje de trubendo kaj orangizad-aŭtomato kiel blue aŭ nigre skribitaj kopioj. Tiuj lingvoj, kiujn bezonas nur unu aŭ malmultaj kunlaborantoj, nun povas esti presitaj senpere de presilo de komputilo. Nuntempe tio estas la plej ŝparema vojo (rilate al labortempo de komputilo kaj papero) provizi ĉiujn kunlaborantojn per la necesaj indikoj. Ni komprenas la deziron de kelkaj grupanoj ricevi la kompletajn presitaĵojn. Sed ni ĉiam devas ekspliki, ke tiun ĉi laboron ĉiuj kunlaborantoj plenumas libervole, senpage kaj krom tio kun pli aŭ malpli grandaj propraj financaj oferoj. Do, ni ĉiam pripensas, kiel ni povas moderigi la elspezojn.
- 4.5. La tutunuan version de slipoj kun la esprimoj en ĉiuj lingvoj, kiujn oni povas trovi en la biblioteko en Eberswalde, ni daŭrigos sendi al ĉiuj kunlaborantoj kiel helpilo dum elekto resp. kreado de plej favoraj Esperant-lingvaj termin-proponoj. Ni atendas en

- Eberswalde nur liston de tiuj proponoj kaj aldonajo aŭ korektado por la respektiva etnolingvo. Ni substrekas: Estas samgrave aldoni mankantajn esprimojn kiel ankaŭ korekti erarojn kaj indiki esprimojn, kiuj estas dubaj aŭ absolute eraraj. Dubajn esprimojn ni indikos per demandsigno por atentigi pri la plua prilaborado.
- 4.6. En n-ro 12/1985 de FI ni demandis la ruse parolantajn grupanojn, ĉu ni enmetu por la rusa lingvo la perfektan kaj neperfektan aspektojn de verboj. Ĝis nun mankas respondo.
  - 4.7. Ligita kun la uzado de komputilo estas la kodado de tiuj literoj, kiuj deflankiĝas de la latina alfabeto. Helpe de Ĉambro de Tekniko ni verŝajne baldaŭ povas uzi grafik-kapablan pinglo-presilon, per kiu oni povus presi la literojn ekstere de la latina alfabeto. Sed tiam mankas programisto, kiu povas/volas krei la bezonotan programaron (softvaro). Estonta nesolvita problemo estos la jena: Perkomputile ordigi la esprimojn/terminojn de la unuopaj lingvoj laŭ iliaj specifa alfabeto.
  5. Kelkaj teknik-formalaj detaloj.  
Ni opinias, ke necesas mencii en tiu ĉi raporto ankaŭ kelkajn teknikajn, formalajn aferojn, ĉar oni ilin ĉiam denove forgesas resp. la laboro naskis kelkajn ŝanĝiĝojn.
    - 5.1. En la unua linio staras ĉiam nia kuranta numero de la nocio kaj post punkto la numero de la versio. Post du interspacaj signoj sekvas la rilata numero el de la IUFRO-aprobita "Terminology" (TS) – se la difino rilatas alian vortspecon.
    - 5.2. La indiko de lingvoj en la slipoj konsentas kun la normon iso r 639.
    - 5.3. En la teksto estas malpermesita ĉiu cifero, escepte la kodiciferojn.
    - 5.4. Por la kirilaj literoj validas la transliterado laŭ normo 1362 de KREH.
    - 5.5. Ĉe la indiko de la plurvortaj esprimoj/terminoj la unan lokon havu – kiel ĝenerale uzata en multaj vortaroj – la ĉefa, determina vorto. Komplementaj vortoj, kiuj dum la normala uzado staras antaŭ tiu vorto, oni loku post komo malantaŭ la finan vorton.
    - 5.6. Pluraj esprimoj/sinonimoj - por unu nocio – estu disigitaj per semikolo/punktkomo.
    - 5.7. Signoj, kiuj speciale karakterizas esprimon/terminon, staras malantaŭe; ekz. > en pli vasta signifo ol la artikolvorto aŭ + por arkaika esprimo.
    - 5.8. La norma tildo/ondosigno por ripetiganta vorto aŭ vortparto estas presita diversforme per la komputiloj. La tildo rilatas vorton aŭ vortparton – indikitan per vertikala streko aŭ alia speciala signo – starantajn je la sama loko en la antaŭa parafrazo.
    - 5.9. Kiel paper-formato de slipoj ni plue uzos A5 altformate, por ke oni povas faldi la slipon kaj meti ĝin en keston kiel A6-formaton.
    - 5.10. La fontindikojn per majuskloj –laŭ la "Bibliografio de arabarmastrumada literaturo" – kaj per minuskloj por ĝis nun ne publicitaj – resp. ne trovitaj – proponoj montriĝis taŭga. Pli kompleta indiko per ĉiuj fontindikoj kun paĝo ktp. estus dezirebla, sed plialtigus la laborkvanton kaj sekve la tempon ĝis la publikigado de la vortaro. Tial la plimulto de la kunlaborantoj verŝajne ne konsentos ŝanĝi la nunan agadmanieron.
    - 5.11. Kelkfoje ekzistas vortoj sur la slipoj – precipe hungaraj -, kiuj komenciĝas aŭ finiĝas per ligstreko. La signifo aperas neklara. La kunlaborantoj de la koncernaj lingvoj kontrolu, ĉu oni povas anstataŭi la ligstrekojn per ripet-signoj/tildo aŭ kompletigi per aliaj indikoj.

- 5.12. En la slovaka lingvo la “t” kun la signo ˇ (haček) estas presata kiel “t” kun vertikala apostrofo. Tial kodato “2t” ne ekzistas, sed nur “10t”
- 5.13. Nia ĝisnuna sekretarino B. Engelmann bedaŭrinde transloĝigos al alia urbo. Ni tre dankas pro ŝia multjara laboro. La estonta adreso de nia sekretejo estos: Kulturbund der DDR, Kreissekretariat, (IFRE), W.-Pieck-Str. 5, Eberswalde-Finow, DDR 1300.

Mi dankas pro via atento kaj deziras, ke ni plue sukcese kunlaboru per via pripensado, viaj proponoj, viaj agadoj celante nian komunan profiton omage al d-ro Zamenhof.

K.-H. Simon

**fake k. lingve reviziis: Ingward Ullrich**